

La 30an de julio

Ekde la 19a de julio ĝis la 9an de aŭgusto mi vojaĝis al Ĉinio kaj Vjetnamio por partopreni en la ILEI-konferenco, la UK kaj la IJK. Dume okazis gravaj aferoj, do retrorigardante mi raportos pri la okazintaĵoj dum tiuj 20 tagoj.

Granda manifestacio de la 16a de julio

La 16an de julio okazis “Kunveno por adiaŭi nukleajn centralojn” en la Parko Jojogi en Tokio, en kiu partoprenis 170 000 homoj. Jen estas citaĵoj el la ĵurnalo Akahata (la 17an de julio):

Tiun ĉi kunvenon iniciatis verkisto Ooe Kenzaburoo, nobelpremito, kaj aliaj ok famaj homoj. La unua kunvenejo (piedpilkejo), la dua (subĉiela koncertejo) kaj unu-kilometra strato estas plena de homoj.

El Fukuŝima venis pli ol 1000 homoj per 26 busoj.

S-ino Suzuki Ŝizuko (76-jara) el la urbo Namie kun panelo ‘Kolero’ diris: “Mi ne scias, kiam mi povos reveni hejmen. Mi kontraŭas atomenergion tiel longe, kiel mi vivos”.

S-ino Ŝibata Akemi el Namie diris: “Mia 13-jara filino foje ploras en malluma ĉambro. Ŝi ne povas viziti lernejon. Ekzistas neniu elekto krom malservigi reaktorojn”.

S-ro Kokubu Mamoru, 75-jara eksa instruisto, diris: “Japana politiko estas tro malbona. Mi iros ien ajn por protesti kontraŭ atomenergio”.

Grandaj manifestacioj de la 29a de julio

La 29an de julio okazis Manifestacio por ĉirkaŭi la parlamentejon kaj 200000 homoj partoprenis. Unue ili partoprenis en la kunveno en la Parko Hibija, kaj poste promenante kaj tenante kandelojn, ili atingis la parlamentejon kaj ĉirkaŭis ĝin.

Antaŭ la pordego de la parlamentejo mezlernejanino f-ino Nakamura Runa parolis jene:

Ni, geknaboj, ne povas voĉdoni en la elektoj, kaj preskaŭ ne havas okazon eldiri niajn opiniojn al la publiko. Mi nun havas du petojn al la parlamentanoj kaj plenkreskuloj:

La unua estas, ke vi donu al ni okazon scii veron pri atomenergio kaj

rajton por decidi, ĉu ni daŭre uzu ĝin aŭ ne. En mia lernejo mi lernis pri Ĉernobil nur unu horon. Tio tute ne estas sufiĉa. Montru al ni, kio okazis en Fukuŝima, en kia stato nun estas Japanio, kion ni povas fari, ktp., inkludante nebulajn, bonajn kaj malbonajn informojn. Ni volas havi okazon lerni.

Atomenergio rilatas al nia estonteco kaj nia vivo, tial ankaŭ ni havas rajton por decidi pri ĝi. Se ni daŭre dependos de ĝi, povos okazi simila akcidento kiel en Fukuŝima. Eĉ se ne okazos akcidento, ni forĵetos danĝerajn nukleajn rubaĵojn en la estontan mondon.

La dua estas, ke por malservigi nukleajn centralojn, vi, plenkreskuloj, partoprenu en manifestacioj, kolektu subskribojn, sendu opiniojn al la registaro, voĉdonu al kandidatoj, kiuj kontraŭas atomenergiecon.

Parlamentanoj laboru por ke niaj opinioj estu akceptitaj en la politiko. Laboru, por ke ĉiuj nukleaj centraloj malserviĝu.

Kiamaniere amaskomunikiloj raportis pri la manifestacio de la 16a de julio

En Japanio troviĝas jenaj tutjapanaj ĵurnaloj: Asahi (demokratia, sed lastatempe multaj dubas pri tio), Mainiĉi (iom demokratia), Jomiuri (maldekstra), Sankei (neimageble dekstra, aĉa) kaj Nikkei (dekstra, ĉar ĝi estas industria). Multaj kleraj homoj abonas Asahi, sed nun multaj abonantoj jam ne fidus ĝin.

En la televida mondo troviĝas NHK (duonŝtata), TBS, Nihon (apartenanta al la ĵurnalo Jomiuri), Asahi (apartenanta al la ĵurnalo Asahi), Fuĵi (apartenanta al la ĵurnalo Sankei), Mainiĉi (apartenanta al la ĵurnalo Mainiĉi) kaj alia.

Tiuj grandaj amaskomunikiloj ĉiam neglektis kontraŭnukleajn kaj ĉiu demokratiajn movadojn. Eĉ amasiĝis 100000 homojn, ili preskaŭ neniam raportis pri ĝi. Tial ni devas atendi raportojn de Akahata (la ĵurnalo de Komunista Partio) kaj Tokio (loka ĵurnalo en Tokio, sed ĝia sinteno estas por la konstitucio kaj kontraŭ atomenergiecon).

En Akahata aperis jena artikolo pri sintenoj de tiuj amaskomunikiloj (la 30an de julio):

La Societo por paroli pri amaskomunikiloj konsistantaj el elsend-koncernatoj kaj civitanoj monitoris pri ĉefaj novaĵprogramoj pri la manifestacio de la 16a de julio. Resume la societo menciis, ke la sintenoj

de amaskomunikiloj eksanĝiĝis.

La plej multe raportis TBS en la kadro de “Novaĵo 23 Kruco (News 23 Cross)” dum 9 minutoj kaj 37 sekundoj. Ĝi raportis la progreson de la kontraŭatomenergia movado kun diagramo.

Asahi raportis en “Stacio Raportado” dum 5 minutoj kaj 30 sekundoj, ĉefe temante pri rifuĝintoj el la urbo Namie, Fukuŝima. Komentariisto taŭge finis la raporton per la vortoj “Ni ne devas esti indiferentaj pri politiko”.

Nihon raportis relative bone voĉojn de partoprenantoj en “Novaĵo Nulo (News Zero)” dum 2 minutoj kaj 45 sekundoj.

Kontrasta estis la duanŝtata NHK. Ĝi raportis nur unu minuton en “Novaĵo 7”. Ŝajnis, ke NHK intence elektis neviglajn bildojn, kaj tial ne sentiĝis volo raporti bone. Ankaŭ en “Novaĵ-Observado 9” ĝi raportis nur unu minuton kaj ne menciis parolojn de la organizantoj. La societo severe kritikis NHK-on, komentante: “Se tio estas la baza politiko de NHK, ni devas esplori, de kie ĝi venas”.

De kie venas ŝanĝiĝo de privataj elsendstacioj? Ĝi analizas, ke kritikoj al maskomunikiloj en interreto kaj analizagadoj de civitanoj influas ilin. (Fino de la citaĵo)

Ankaŭ en ĵurnaloj ekaperis raportoj pri manifestacioj. Ni povas diri, ke niaj agadoj komencis influi la ĵurnalistan mondon, kaj ankaŭ la politikan mondon. Tamen mizera estas japana amaskomunikiloj, kiuj devus antaŭvidi la estontecon, sed en efektiveco ĝi sekvas la tajdon, nome sekvas plifortan flankon.

HORI JASUO